

Wilhelm Müller,

Ĉe put' antaŭ pordego

tradukita de Joachim Gießner

Ĉe put' antaŭ pordego
jen staras la tili'.
En ĝia ombro dolĉe
ja ofte revis mi.
Mi tranĉis karaĵn vortojn
en ĝia kruda ŝel'.
En ĝojo kaj doloro
ĝi restis mia cel'.

Mi devis pretermigri
dum nokta obskurec'.
Mi fermis la okulojn
en nigra malhelec'.
Kaj kvazaŭ min vokante
la branĉoj muĝas jen:
"Ĉi tien vi nur venu
kun via korĉagren'."

Malvarma vento blovis
dolore kontraŭ mi.
De l' kap' ĉapel' forflugis,
ne turnis mi al ĝi.
Nun malproksima estas
mi for de la tili',
sed vokas ĝi: "Nur venu,
trankvilon trovos vi!"

...

Wilhelm Müller,

La tilio

tradukita de Ludwig Emil Meier

Ĉe l'puto antaŭ l'urbo
Jen staras la tili',
En kies ombro dolĉe
Revadis ofte mi.
En ĝia ŝel' tranĉite
Vidiĝas ama dir',
Kaj daŭre min altiras
Al ĝi la korsopir'.

Hodiaŭ, ĉe noktmezo
Mi pasis ĝin, migrul',
Ho! Spite la malhelo
Fermiĝis la okul'.
Sed ĝiaj bonaj branĉoj
Alvokis ŝajne min:
"Alvenu, ho junulo,
Ni repacigos vin!"

Alblovis vent' malvarme
Kun granda energi',
Ĉapelon ĝi fortiris,
sed ne turniĝis mi.
Kaj nun, post kelka mejlo
De interspaco, ho!
Ankoraŭ bruas l'arbo.
"Ĉe mi paciĝu do!"

...

Wilhelm Müller,

Ĉe puto antaŭ l'urbo

tradukita de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj)

Ĉe puto antaŭ l' urbo
jen staras la tili',
en kies ombro dolĉe
revadis ofte mi.
Mi tranĉis en la ŝelon
amsignojn pro memor';
sopir' min tien logis
en ĝojo kaj dolor'.

En lasta nokto pasis
mi preter la tili',
sed malgraŭ la malhelo
okulojn fermis mi.
Jen ĝiaj branĉoj muĝis
kaj ŝajnis logi min:
"Restadu, ho migrulo,
ni trankviligos vin!"

La vento kontraŭblovis,
ĉapelon ŝiris for.
Sed pelis min antaŭen
turmentoj de la kor'.
Se plue mi vagadus
eĉ ĝis la monda fin',
la branĉoj ĉiam logus:
"Ni trankviligos vin!"

...

Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25) en 2001-11.

Arg-83-165 (2003-12-28 22:58:15)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro “Mia kantaro I”, kiun eldonis JOSEF SCHIFFER (Wilstorffstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio) en 2001.

Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1907.

Arg-83-166 (2014-05-31 14:26:54)

Tio estas la origina tradukversio de L. E. MEIER. Ĝi troviĝas en la kantlibreto “Esperantista Kantaro”, kiun eldonis HANS TH. HOFFMANN en 1907 en sia eldonejo en Berlino, Steglitzer Str. 44. Tiu ĉi esperantigo troviĝas ankaŭ en http://kantaro.ikso.net/la_tilio. Vidu ankaŭ: <http://194.95.59.225/index.php?id=3623>.

Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de Ludwig Emil Meier (kaj aliu-
loj).

Arg-83-164 (2003-11-09 21:14:39)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la germana Esperanto-lernolibro “Post la kurso” de WILHELM kaj HANS WINGEN, sur paĝo 68. Sube estas indikite tie: “Laŭ L. E. Meier k. a.”. El tio oni povas konkludi, ke ĝi ne estas la origina tradukversio de L. E. MEIER kaj ke ĝi estas iom ŝanĝita de aliuloj, eble de la frat-
toj WINGEN mem.